

La arbo de la sciado de Pio Baroja tradukita de Fernando de Diego

79-a volumo de Stafeto, 2-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 532, 1973.12.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon okaze de la zamenhofa festo ni kuraĝigis vin aĉeti la romanon *La arbo de la sciado* de Pio Baroja, talente elhispanigita de Fernando de Diego kaj eldonita de Juan Régulo-Pérez en la libro-marko Stafeto. Ni konkludis nian recenzon promesante al vi la legon de fragmento el la unua ĉapitro, kies titolo estas : *Andrés Hurtado komencas la universitaton*.

A.- *Estis ĉirkaŭ la deka matene de oktobra tago. En la korto de la Arkitekta Lernejo, grupoj de studentoj atendis la malfermon de la klasĉambro.*

Cl.- *De la strato Estudios, tra pordo, kiu rigardis la korton, eniris junuloj, kaj ili salutis, ridis kaj parolis unuj la aliajn, kiam ili sin kune vidis.*

A.- *Pro unu el la karakterizaj anomalioj de Hispanujo, la studentoj, kiuj atendis en la korto de la Arkitektura Lernejo, ne estis futuraj arkitektoj, sed estontaj kuracistoj kaj farmaciistoj. [...]*

Cl.- *La ĉeesto de tiom da studentoj, kaj ilia urĝo por eniri en la klasĉambro, facile kompreniĝis, ĉar temis pri la unua tago de la kurso kaj de la komenco de la universitataj studoj.*

A.- *Tiu transiro de la liceo al la fakultato ĉiam vekas en la studentoj kelkajn iluziojn, igas ilin pensi, ke ili estas pli maturaj, ke ilia vivo ŝanĝiĝos.*

Cl.- *Andrés Hurtado, iom surprizita sin trovi inter tiom da kamaradoj, atente rigardis, apoginte sin al muro, pordon ĉe angulo de la korto, kiun pordon li estis baldaŭ traironta.*

A.- *La junuloj grupiĝis antaŭ tiu pordo, kiel publiko antaŭ teatra enirejo.*

Cl.- *Andrés ankoraŭ sin apogis kontraŭ la muro, kiam iu ekprenis lian brakon kaj diris :*

A.- *Hola ! Vi!*

Cl.- *Hurtado sin turnis, kaj rekonis sian licean kolegon Julio Aracil. Li estis antaŭe kunlernanto ĉe la liceo San Isidro, sed Andrés de longe ne vidis Julion. Ĉi tiu diris, ke li studis sian lastan licean jaron en provinco.*

A.- *Nu, ankaŭ vi ĉi tie? - demandis Aracil.*

Cl.- *Vi ja vidas.*

A.- *Kion vi studas ?*

Cl.- *Medicinon.*

A.- *Ho ! Mi ankaŭ. Ni studos kune.*

Cl.- *Blondbarba kaj klar-okula junulo, laŭaspekte pli aĝa ol Julio, akompanis lin. Ĉi tiu junulo kaj Aracil, ambaŭ bonedukitaj, malestime parolis pri la aliaj studentoj, pliparte nepoluritaj provincanoj, kiuj esprimis per krioj kaj ridegoj la ĝojon kaj la surprizon sin trovi kune.*

A.- *Oni malfermis la klasĉambron, kaj la studentoj, pli rapidante kaj sin interpremante, komencis eniri kvazaŭ ili irus rigardi distran spektaklon. [...]*

Cl.- *Aracil, lia amiko kaj Hurtado sidiĝis kune. [...] De la planko ĝis proksime al la plafono, amfiteatre staris benkaro tre dekliva, kun centra ŝtuparo, kio donis al la klasĉambro aspekton de teatra galerio.*

A.- *La studentoj okupis la benkojn ĝis preskaŭ la plej alta vico, la katedra profesoro ankoraŭ ne venis, kaj, ĉar tie troviĝis multaj tumultemaj studentoj, iu komencis bateti per sia bastono la plankon ; multaj imitis lin kaj estiĝis furioza bruado.*

Cl.- *Subite, malfermiĝis pordeto en la fundo de la podio kaj alpaŝis maljuna sinjoro, tre tualetita, sekvata de du junaj asistantoj.*

A.- *Tiu efekta apero de la profesoro kaj liaj asistantoj kaŭzis murmuregojn ; unu el la plej sentimaj studentoj ekaplaŭdis kaj, kiam oni vidis, ke la profesoro ne nur ne incitiĝas, sed eĉ salutas kvazaŭ danke, ankaŭ aliaj aplaŭdis.*

Cl.- *Ĉi tio estas ridindaĵo - diris Hurtado.*

A.- *Ŝajnas, ke li ne opinias same - Aracil ridante respondis - Sed, se li estas tiel stulta, ke li ŝatas aplaŭdojn, ni aplaŭdu lin.*

Cl.- *La profesoro, ridinda, pedanta kompatindulo, iam studis en Parizo, kie li akiris la gestojn kaj la manierismojn de la francoj fanfaronaj.*

A.- *La bonulo komencis tre emfazan kaj bombastan salutparoladon kun kelkaj sentimentalaj tuŝoj. Li parolis pri sia majstro Liebig, pri sia amiko Pasteur, pri sia kolego Berthelot, pri la mikroskop-arto. [...]*

Cl.- *Liaj blankaj haroj, longaj ĝis la kolo, liaj gumitaj lipharoj, lia pinta barbeto, kiu tremetis kiam li parolis, lia bombasta kaj solena voĉo donis al li aspekton de severa patro el dramo ; unu studento, ekrovinte tian similecon, deklamis per laŭta kaj kaverna voĉo la versojn, kiujn, laŭ la dramo de Zorilla, diras Don Diego Tenorio, enirante en la gastejon El Laurel: « Ke viro kiel mi, tiel ranga, descendu al tiu loĝejaĉo... »*

A.- *La sidantoj apud la nerespektema deklamanto ekridis, kaj la aliaj studentoj rigardis la grupon de la tumultemuloj.*

Cl.- *Kio estas tio ? Kio okazas ? - demandis la profesoro, surmetante siajn okulvitrojn kaj proksimiĝante al la podia balustrado Ĉu iu perdis hufferon ? Mi petas al la sidantoj apud tiu azeno tiel perfekte blekanta, ke ili apartiĝu, ĉar ĝiaj hufobatoj estas sendube mortigaj.*

A,- La studentoj ridis kun entuziasmo; la profesoro finis la klason sin retirante kun ceremonia saluto, kaj la junuloj senlace aplaŭdis. [...]

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond legis la komencon de la romano *La arbo de la sciado* de Pio Baroja, kiun ĵus eldonis Stafeto. Gis reaŭdo!

Kopirajto © Cl.aude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012